Maison Culturelle des Espérantistes Français
Coopérative de consommation civile à capital variable
Siège social : Grésillon, 49150 Pontigné
RCS (49) Angers n° 522 621 556

DUA KUNVOKO al EKSTERORDINARA MEMBROKUNVENO

sabaton, la 10an de marto 2012

Kun nur 80 ĉeestantoj aŭ anstataŭatoj, t.e. 14% el la societanoj, la Eksterordinara Membrokunveno de la Kulturdomo de Esperanto okazinta mardon, la 21an de februaro 2012 ne atingis la necesan kvorumon (50%). Ni do petas vin partopreni en la dua Eksterordinara Membrokunveno, kunvokata kun la sama tagordo

Sabaton, la 10an de marto 2012 je la 14a

en kastelo Greziljono, por interalie ĝisdatigi la statuton de la Societo kaj formale ebligi la projekton por la malfermo aprobitan de pasinta jarkunveno. Tiu ĉi membrokunveno validos sendepende de kvorumo. Vi rajtos elekti anstataŭanton. Por ebligi al kiel eble plej granda nombro da societanoj esprimi sin, la voĉdono por statutŝanĝoj okazos perkoresponde, laŭ la tradicia proceduro. Tamen la aliajn rezoluciojn, pri kiuj necesos surloka debato, voĉdonos surloke nur la ĉeestantoj kaj societanoj reprezentataj de ili.

Ni atentigas vin, ke la voĉdoniloj kaj rajtigiloj de la unua membrokunveno ne estos enkalkulataj por tiu ĉi dua membrokunveno. **Bonvolu denove voĉdoni per la ĉi-kunaj voĉdoniloj,** kaj (se vi ne mem ĉeestos) sendi novan rajtigilon.

Ni antaŭdankas pro via ĉeesto, la Administra Komitato

TAGORDO

1 – aprobo de la protokolo de la pasinta jarkunveno (12a de marto 2011)

2 – eksigo de XXX, laŭ artikolo 6 de la statuto

3 – nuna stato de la konstrulaboroj
- konstrulaboroj finitaj depost la lasta jarkunveno
- konstrulaboroj nun farataj
- planado de sekvontaj konstrulaboroj
- kontrakto kun ERDF (tutfranca firmao pri elektrotransportado) por trairigi subteran meztensian kablon tra nia bieno, sub la vojeto al la kastelo

4 – ĝisdatigo de la statuto kaj unuaj konsekvencoj
- proceduro por renovigo de la Administra Komitato en jarkunveno (junio 2012)
- perdo de societaneco: ne plu troveblaj societanoj

5 – nunaj kaj estontaj projektoj
- financado de la estontaj konstrulaboroj
- teatra altlernejo « Morgaŭ la Printempo » *(www.dlptheatre.net)*
- projekto de Claude Bensimon *(asocio pri ĝeneraligita popola edukado)*
- projekto de Pierre Soubourou kaj Elisabeth Dubot *(daŭra mastrumado de la kastelo)*

Greziljono

festas sian sesdekjariĝon!

Por soleni tiun ĉi eventon, ni planas kunvenigi grandan nombron el tiuj, kiuj konis la « unuajn » jarojn de Greziljono, kaj danki al la volontuloj, kiuj portis la historion de la kastelo.
Tia renkontiĝo estos organizita

Sabaton, 30^{an} de junio kaj dimanĉon, 1^{an} de julio 2012^{a}

Antaŭan dankon pro via partopreno kaj dankon, se vi povos averti pliajn « malnovulojn », kiujn ni eble forgesis.

nia programo estas konsultebla en nia retejo: http://gresillon.org
vi povas atingi nin ĉe retadreso: **kastelo@gresillon.org**
aŭ ĉe telefonnumero: **+33 2 41 89 10 34**

Ni menciu interalie:

13 – 21 aprilo 2012: printempa semajno
Seminario kun Mirejo Grosjean (Svisujo) kaj Miguel Angel Gonzalez Alfonso (Kubo)
Trejnado por ekzamenoj, kun Christophe Chazarein kaj Zsofia Korody (ILEI)

21 – 28 julio 2012: arta semajno
(teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj)

28 julio – 4 aŭgusto 2012: alternativa semajno
(kun verd-politika seminario)

4 – 11 aŭgusto 2012: turisma kultura semajno
(kursoj pri esperanto kaj la franca, ekskursoj al la kasteloj ĉe rivero Luaro)

11 – 20 aŭgusto 2012: familia semajno
(pupteatra festivalo, muziko, gitaro, sporto, ludoj… kaj Esperanto-kursoj)

Christian VACHERON
1941 - 2012

Nia kasisto **Christian Vacheron** forlasis nin la 4an de februaro 2012.

Kun simpleco, efikeco, bonvolemo, li estis tre aktiva en multaj asocioj, Esperantistaj, politikaj, sindikataj… pli ol cent homoj ĉeestis lian kremacion, la 10an de februaro. Elektita en 2010 kiel Komitatano de Greziljono, li akceptis la taskon kasisto en malfacila periodo.

Christian tute ne estis malsana, li forpasis pro koratako. Unu tagon antaŭ sia morto, li aktive partoprenis en kontrolado de nia kunvokilo al Eksterordinara Membrokunsido de la 21a de februaro.

Koncerne la tagordon de la 10a de marto 2012

Pri kelkaj punktoj, vidu aldonajn dokumentojn en nia retejo
rubriko « Membrokunvenoj » (**gresillon.org**/kunveno)

1 – La **protokolon de la jarkunveno de la 12a de marto 2011** vi jam ricevis kun la antaŭa kunvokilo. Ni resendas ĝin rete al tiuj el vi, kies retadreson ni konas, kaj vi povas ĝin konsulti en nia retejo, aŭ peti nin resendi ĝin al vi perpoŝte.

2 – **Eksigo de XXX**

La eksigo de XXX jam estis en la tagordo de la pasinta jarkunveno, sed ni ne povis voĉdonigi ĝin ĉar tio postulus 50%-a kvorumo (artikolo 15 de la statuto).

XXX, kontestante sola kontraŭ ĉiuj la decidojn de la jarkunveno, post turmentado de la antaŭa kaj la nuna Administraj Komitatoj per registritaj leteroj miksantaj sensignifajn problemojn kaj mensogajn akuzojn, kalumnie denuncis nin pro « falsa deklaro al Registro pri Komerco » (laŭ nia scio, tiu ĉi denunco ne havis juran konsekvencon).
Tiaj agoj de XXX malutilas al la Societo:

- ĉar ili celas senkreditigi la elektojn de la jarkunveno,
- ĉar ili provas daŭrigi la malnovajn kverelojn, kiuj konsiderinde damaĝis la allogecon de la kastelo kaj kaŭzis sep sinsekvajn jarojn de deficito,
- ĉar ili klopodas misinformi kaj estigi senfondan timon, dum la restarigo de nia Societo postulas unuavice, ke ni laboru serene, ĉiuj kune al la sama projekto.

3 – nuna stato de la **konstrulaboroj**

konstrulaboroj finitaj depost la lasta jarkunveno:

- instalado de hejtiloj, interalie en la frontaj ĉambroj de la kastelo,
- kreado de novaj duŝoj en la dua etaĝo
- refreŝigo de la legomlavejo kaj manĝilarejo (muroj, bretoj…)
- pristudo de subteraj tuboj post fekaj refluoj okazintaj en somero 2011
- preciza mezuro de altecoj de diversaj punktoj en la korto

konstrulaboroj nun farataj

- anstataŭigo de la tubaro interalie el la necesejoj,
- kahelado de la manĝilarejo

planado de sekvontaj konstrulaboroj

- ekstera ŝtuparo de la teretaĝo ĝis la dua etaĝo
- plibonigo de la komforto (dormoĉambroj kaj litoj)
- horizontaligo de la korto

ERDF *(tutfranca firmao pri elektrotransportado)*

Kadre de turisma disvolviĝo de la ĉirkaŭaĵo de Baugé, ERDF petas permeson trairigi tra nia bieno meztensian subteran kablon 1 m sub la vojeto al la kastelo. Claude Bensimon estas komisiita negoci la kondiĉojn kaj kompensojn de tiu trafosado (subterigi je kosto de ERDF ankaŭ niajn elektrajn kaj telefonajn kablojn, ne tro proksimiĝi al la konstruaĵoj, bele ripari la vojeton…) sed la interkonsento inkluzivas nepre, ke ni daŭre rajtigu ERDF ĉiumomente enveni nian bienon por bonteni la tieajn subterajn kablojn, kaj tiun ĉi rajtigon povas konsenti nur ĝenerala membrokunveno.

4 – ĝisdatigo de la **statuto**: vi ricevis kun la unua kunvokilo franclingvan dokumenton kun la nuna statuto (origina, de la jaro 1951) kaj la modifoj, kiujn ni proponas. Tiun ĉi, kune kun Esperantlingva traduko, ni resendas rete, kaj ĝi daŭre konsulteblas en la retejo, vi ankaŭ povas peti poŝtan sendon. Ni atentigas vin pri tajperaro en la dokumento: **la artikolo 10 proponas 10 administrantojn kaj ne 9,** ĝustas la voĉdonilo. Unuaj konsekvencoj de la nova statuto, se aprobita, estos:

Proceduro pri renovigo de la Administra Komitato

La proponata statuto fiksas je **10** (anstataŭ 12 nuntempe) la nombron de Komitatanoj. Venonta jarkunveno okazonta en junio 2012 devos renovigi duonon de tiu ĉi Administra Komitato, laŭ proceduro fiksota dum la nuna eksterordinara membrokunveno.

Perdo de societaneco: ne plu troveblaj societanoj

La proponata statuto postulas, ke « ĉiu societano devigas sin interesiĝi pri la Kulturdomo, partoprenante persone aŭ perkoresponde en la membrokunvenoj aŭ aranĝoj organizitaj de la Kulturdomo ». Tio ĉi celas ne eksigi societanojn, sed unuavice disponi vere aktualan Registron de societanoj: dekoj da societanoj, pri kiuj ni havas nek vivsignon nek validan adreson de pluraj jaroj, malgraŭ aktivaj klopodoj retrovi ilin, eĉ ne plu ricevas la kunvokilojn al niaj membrokunvenoj, kaj tio malĝustigas la kalkulon pri kvorumo. Unuavice ilin ni celas forstreki per la supra artikolo, laŭ proceduro fiksota dum la membrokunveno.

5 – nunaj kaj estontaj **projektoj**

Financado de konstrulaboroj

Niaj nunaj enspezoj ne sufiĉos por financi diversajn konstrulaborojn, kiujn ni nepre planu por baldaŭa estonteco. Unu el la proponoj estas emisii novajn societajn partojn, po 200 € ekzemple, rajtigantajn interezon en profitdonaj jaroj. Tian emision ĉiukaze povos decidi nur nova tiucela membrokunveno.

Teatra altlernejo « Morgaŭ la Printempo » *(www.dlptheatre.net)*

De pli ol dek jaroj, « Morgaŭ la Printempo » organizas en Minsko (Belorusio) teatran altlernejon ruslingvan por franclingvanoj. Ili proponas lupreni Greziljonon por novtipa projekto: kunigi po unu el ĉiu lando de Eŭropa Unio studentojn, kiuj surloke lernos Esperanton por komuniki inter si. La jarkunveno en 2011 jam permesis daŭrigon de la negocado. Ĉi tiu okupo de la kastelo ne malhelpos niajn proprajn kutimajn staĝojn kaj aranĝojn. Ĉar la projekto postulas longan preparadon (ĝin financos plejparte subvencioj Eŭropaj, naciaj kaj lokaj), ĝin oni planas nur ekde 2014.

Projekto de Claude Bensimon *(asocio pri ĝeneraligita popola edukado)*

Por prepari la mensojn al la paca ŝanĝiĝo de ekonomia, politika kaj interrilata reĝimoj en la morgaŭa socio, tiu ĉi projekto pri ĝeneraligita popola edukado, inspirita per la verkoj de biologo Henri Laborit (*La Nouvelle Grille* « la nova krado », 1974), revivigante similan agadon okazintan en Lorient inter 1976 kaj 1981, ebligos venigi al la kastelo, per organizo de staĝoj, seminarioj, prelegoj kaj debatoj… novan publikon Esperantistan kaj ne-Esperantistan, sed kies pensmaniero kongruos kun la Esperantista ideo (Tajĝiĉjŭano, jogo, ktp). Vidu en la retejo de Greziljono pli precizan priskribon.

Projekto de Pierre Soubourou et Elisabeth Dubot *(daŭra mastrumado de la kastelo)*

Ŝtonĉjo kaj Libnjo, kiuj enamiĝis al la kastelo kaj deziras aktive partopreni ĝian disvolvadon kaj pli ĝenerale la disvolviĝon de Esperanto, proponas plenumi ĉiaman deĵoron, kunhelpi administradon de la kastelo, organizi eventojn (kaj por vivigi Esperantistajn renkontiĝojn, kaj por financi modernigadon de Greziljono: projekti, komuniki, intendanti ktp), instigi skipan spiriton… La prezento detalos la konsideratajn projektojn, antaŭviditajn merkatojn kaj prikonsideros la necesan interkonsenton kun la socieo kaj ties Administra Komitato.